



ABONPREZO:

Por Bulgarujo — 30 leva
 Por Eksterlando - 2 sv. fr. Aparta n-ro 4 lv.

ANONCPREZO:

Komerconcoj - 2 lv. kv. cm.; koresponda - 10 lv.

ADRESO:

REDAKTEJO kaj ADMINISTREJO
 str. „P. MAGLOV“ 4, RUSE. TEL. 553.

Redaktoro: IVAN KOTOV.

Rekomendoj de C. K.

Videble estas, ke la vivo de la societoj devas plivigliĝi. Tial, do, necesas kompreno kaj sekvi insiste la vojon, kiu kondukus al la komuna celo. Antaŭ ĉio, ni devas koncentrigi niajn fortojn kaj la suno de sindoneco kaj fideleco devas lumigi la sekvatan vojon.

C. K. opinias, ke ĝi havas la raĵon kaj devon montri kelkajn taskojn, plenumotajn de la societoj kaj de ĉiu aparta esperantisto.

I Ni devas aranĝi en la tuta lando Esperanto-kursojn por komen-
 cantoj kaj progresintoj. Krom la pure teoria, oni devas ankaŭ uzi la
 senperan, naturan, paroligan metodon. Dum la kuranta asociaro en la
 urboj kaj vilaĝoj, kie ekzistas esperanto-societoj aŭ apartaj esperan-
 tistoj, ni devas nepre havi esperanto-kursojn. Tiel ni povus varbi no-
 vajn batalantojn kaj atentigi la socion. Rekomendindaj lernolibroj; la
 lernolibro de At D. Atanasov; la lernolibro de Iv. Sarafov; „kurso
 lernolibro“ de Edmond Privat; „Natura metodo“ de Emilo P. Jasse;
 sintaksoj de Zah Zahariev kaj Paul.

II Neniu societo esperanta devas ekzisti izole kaj neorganizite.
 Ĉiu devas prezenti per si mem organizitan tuton sur fundamento

de aprobita de la Ministerio de la Internaj Aferoj kaj harmonianta kun la asocia statuto. Oni streĉe plenumu la postulojn de la ministerio rilate al kunmeto de la societo mem kaj ĝia estraro. Dezirinde estas okazadi regulajn ĉiusemajnajn kaj ĉiumonatajn kunvenojn de la societestraro kaj de la societo mem. La resumon de la pli gravaj decidoj kaj de aliaj kronikindaĵoj oni sendadu oficiale kaj regule al la asocio ne pli malfrue ol la 25-an de la monato, por ke la asocio povu ĝustatempe enpresigi ilin en „Bulgara Esperantisto“. Post la nacia esperanto-kongreso la societoj devas havi jarkunvenon en kies tagordo estu, krom la punkto pri la raportoj de la estra kaj kontrola komitatoj de la societo kaj ilia liberigo de respondeco, ankaŭ raportoj de la delegitoj de la nacia, enlanda kaj eventuale de la internacia esperanto-kongreso; referaĵoj pri estonta agado, laŭ la kongresdecidoj, pri la organizo de la societo kaj pri la kursoj. Tiam oni devas koncize trastudi la rezultojn el la pasinta societjaro kaj detale skizi la estontajn vojojn. En la fino de junio la societoj denove havu jarkunvenojn por resumi la agadon. La estraro preparu ankaŭ skribitan raporton pri sia agado, ekzempleron de kiu oni sendu al la sekretario de la asocio ne pli malfrue ol monaton antaŭ la esperanto-kongreso. En la loko, elektita kiel kongresurbo, oni devas eklabori ĝustatempe por bona organizo de la kongreso. Ĉiu societano, krom si mem, abonigi almenaŭ ankoraŭ 2—3 personojn. Por ke nia asocio bone funkciadu, ni devas garantii al ĝi ĝustatempe kaj plej akurate la necesajn monrimedojn per kotizoj, abonpagoj kaj per speciala asekuranta fondo. Per la lasta la C. K. celas la elpagon de la malnovaj ŝuldoj, monhelpi la organizadon de la kongresoj, eventualan dissendon de elokventaj oratoroj dum la propagandaj esperanto-semajnoj kaj precipe, subtenon de la seninterrompa kaj regula aperado de nia organo „Bulgara Esperantisto“. La societoj ankaŭ malfermu similan fondon. Tial la societoj dum Kristnasko, Pasko kaj la somero aranĝu specialajn vesperfestojn, amuzmatenojn, koncertojn por propagando kaj gajno. Sed ni devas atenti. Ni ĉiam memoru, ke ni devas gardi la puran nomon de esperanto kaj en minacokazo preferi nur la gajnon. 50% de la pura gajno la societoj disponigu al la asocikaso kaj 50% lasu por la sia.

III. Ne devas aliĝi al la societo persono, kiu per sia pens — kaj agadmaniero kaj per sia konduto povas kompromiti la tutan societon kaj la asocion. Por aniĝo oni subskribas specialan peton, enhavantan specialan deklaron, ke la petanto gardas severan neŭtralecon kaj tiu peto devas esti ankaŭ subskribita de aktiyaj membroj de la societo. En la unua sia kunveno, la societestraro decidus, ĉu akcepti aŭ malakcepti la petanton kiel membro. Post la akcepto oni tuj prenas la kotizon kaj abonpagon. Esperanto servas al ĉiuj. Sed la esperanto movado celas nur la propagandon kaj disvastigon de la lingvo; bonan interkomprenon kaj enradikigon de la interna sento, formanta la esperantismon. Kaj tial, neniu organizita en la societo esperantisto devas per-

mesi al si kaŝan aŭ malkaŝan propagandon inter la societmembroj de ideoj aŭ doktrinoj kontraŭdirantaj al la spirito de plena neŭtraleco. Per simila partia agadmaniero oni pruvas al la neesperantista publiko kaj al la registaro, ke ni ne estas neŭtralaj kaj senpartiaj. Nia doktrino estas la esperantismo, ni devas resti fidelaj esperantistoj. Se ni estas neŭtralaj kaj prudentaj — per tio ni gajnos la eksteran publikon, ĉiujn mediojn kaj neniu suspektos nin. La esperantismo ne refutas la amon al patrolando, same kiel la lasta ne refutas la amon al sia familio.

Ni ja povas kaj devas okupi la unuan lokon inter la kultur-klerigaj societoj de nia lando per nia morala, kleriga kaj solidariga rolo, per nia spirita kaj materia forto, disciplino kaj organizemo. Tielmaniere ni prezentas fortikan ŝtonon en la kultura vivo de nia lando kaj gajnos ĉies fidon kaj krediton. Kaj neniu dubos, ke ni portas en niaj organizaĵoj kaj agado la elementojn de malkompreno, degenero, alportantajn katastrofojn al la asocio kaj popolo.

IV Per niaj agadmaniero, neŭtraleco kaj energia movado kaj per la signo de estimo, amo kaj dankemo pro iliaj meritoj, ni regajnu la sin retirintajn el la movado apostolojn kaj dolĉigu iliajn lastajn fagojn, almetante iliajn moralajn fortojn en la esperantan trezorejon por akceli la finan venkon sur la skeptikismo.

V Per sistema, prudenta, konstanta kaj sindona laborado, penante pliriĉigi la trezorejon de nia en — kaj priesperanta literaturo, per nia servado al la popolo kaj inter la popoloj ni altiru la atenton de gravaj kaj eminentaj civitanoj kaj scienculoj bulgaraj al niaj lingvo, ideo kaj movado, tielmaniere, ke ili restu persvaditaj pri la neceso kaj utileco de la plivastigo de Esperanto.

VI. Gardante la politikan kaj religian neŭtralecon, helpante la popolon, fortikigante ĝiajn interrilatojn materialajn kaj spiritajn kun eksterlandanoj, penante per amikoj altiri la atenton de kelkaj influhavaj popolrepresentantoj pri le sendanĝereco kaj granda utilo de nia lingvo por la lernanta junularo kaj popolo mem, ni, paŝon post paŝo, konkeros bonajn poziciojn antaŭ registaro, ĵurnalaro kaj favorigos ilin por nia movado.

La C. K. kredas, ke la bulgara esperantistaro bone komprenos la direktantajn ideojn kaj uzos ĉiujn siajn moralajn kaj materiajn fortojn por la grandpaŝa antaŭenigo de nia movado. Ni, la C. K. anoj, penas forte porti la verdan standardon kaj la pezan krucon per kiu la XV-a kongreso ŝargis nin nur, se ĉiuj esperantistoj, modele organizitaj, prudentaj, energiaj, oferemaj, etendos helpe al ni sian brakon kaj senĉese, neretireble iros al la celo severe difinita, laŭ la vojo klare montrita de nia majstro.

Vivu la bulgara esperantistaro!

Vivu plenforte kaj kuraĝe nia asocio!

Vivu la amikeco kaj solidareco inter la homoj!

Vivu la tutmonda esperanta popolo!

Kun espero kaj neŭtraleco, kuraĝe antaŭen!

LITERATURO.

PENĈO SLAVEJKOF,

SKERCO GRIEG.

Ironte al knabin

Mallaŭte diru ŝin:

Nebul gardenon prujnas, velkas herbfoli

Kaj solas li.

La ĉarmaj floroj jam

Forvelkis, bel-infan,

Forvelkis belinfan, en ama kormalsan

Pro ci en flam.

Ironte al knabin

Mallaŭte diru ŝin:

Nebul gardenon prujnas, velkas herbfoli

Kaj solas li.

Nenion diru plu,

Aludu nur sen bru:

Okulojn fermos li ja baldaŭ kun aŭtun

Dum nokt sen lun.


Ne veu la knabin

Kaj ne riproĉu ŝin

Ke mortos fine li vundita en la kor

Pro am - angor.

Tradukis: Iv. Dobrev.



IV. KOVAĈEV

† Aleksandr Parov-on!

Pluvas ekstere de post la maten'

Kiel ja decas dum aŭtuna monat'

Endome mi kuŝas kun medita mien'

Rememorante pri intima mia konat'!

*

Kaj vidas mi klare dum viva portret'

De mia amiko kun pala vizag'.

Kiu per sia talent' de poet'

En Esperanto verkadis paĝon post paĝ'!

*

Longan tempon pro ftiza malsan'

Suferis li, troe fore de ni,

Inter la Alpoj je freŝa balsam'

Sanecon por havi kaj vivi do pli!

*

Sed terura ja estas la homa destin'

Kiun ni ofte malbenas kun tim,'

Forrabis ĝi nian amikon en fin'

Lasante funebri ni ĉi tie sen lim'!

*

Pluvas ekstere de post la maten'

Kiel ja decas dum aŭtuna monat',

Endome mi kuŝas kun malhela mien'

Larmante pro l'perdo de mia konat'!

Ruse, 15. X. 1928.

Knabin' Salonika.

Tradukis: S. D.

AL. PAROV.

Al F-ino Sofio Smith.

Dufolia rozo estas
Viaj ruĝlipetoj! . . .
Ĉu sur la trunketo kreskas
Multe da dornetoj? . . .

Noxto nigra kaj senstela
Estis en l'animo mia
Kaj nebulo blumalhela
Regis kun mistero ia.

Sed aperis vi Papavo
Jam delonge atendata,
Kaj ekbrilis lum' kun ravo
Lum' de l' koro dezirata.

Papaveto, Papaveto
Vi posedas la belecon,
Por vi, kara knabineto
Mi fordonas la junecon!

En brilantokuloj viaj
Mi ekvidis mian sorton,
En la profundaĵ' iliaj
Mi ekserĉus mian morton!

Papaveto, Papaveto
Vi havanta la belecon,
Por vi sorĉa knabineto
Mi fordonas la junecon!

Ruse, 3. II. 1924.

Feliĉo.

Malproksime malantaŭ montoj kaj arbaroj en regno jam delonge forgesita vivis iam princo, ĉarmjunulo, miriganta per sia beleco kaj saĝo. Sed li neniam kontenta estis de la vivo, sentis sin tro malfeliĉa kaj fine decidis ekiri kaj serĉi la feliĉon, ĉar ĝi malm ne venis.

Longan vojon li pasis, multajn regnojn li trapasis. Sed de la feliĉo, li eĉ postsignon ne rimarkis.

Mirindajn kastelojn el pura kristalo kun ĝardenoj eterne verdaj en kiuj multege da fontanoj de diverskolora marmoro tage kaj nokte elsprucis akvon klara larmo, li renkontis sur sia vojo, sed li eĉ ne ekhaltis por rigardadi ilin kaj ĝuadi ilian fantazian belecon, sed iris antaŭen kun la nura penso pri la feliĉo. De la longa senripoza vojo liaj piedoj ŝveliĝis, vundiĝis kaj postsignis skarlatasangon. Lia iam glata kaj rozkolora vizaĝo, nun pala kaj

malgrasa — sulkiĝis. Liaj okuloj perdis sian brilon, lia hararo antaŭe nigra kiel senluma nokto kaj bukla kiel la blankaj nubetoj sur la blua ĉielo, komencis griziĝi. Li ne povis plu daŭrigi kaj laca sidiĝis preter larĝa vojo por ripozi. Kaj jen, li vidas, ke rekte kontraŭ li, de la kontraŭflanka altaĵeto mal-supreniras junulino envolvita en maldika diafana materio elsub kiu hele konturiĝas la belegaj ovalaj formoj de ŝia korpo. Ŝiaj okuloj brilas kiel du fajretoj kaj ŝia blondbukla hararo libere flirtas en la aero. Ŝia kapo ornamita kun krono de plej diverskoloraj floroj, radiantaj lumetojn. Kaj kun ĉarmoplena rideto ŝi venas al li. Tuj la princo ekkonis la feliĉon, kiun li tiel longe serĉis . . .

Granda ĝojo plenigis lian elturmentitan animon, hela rideto ekaperis sur lia sulkiĝita vizaĝo, kaj kun etenditaj manoj al ŝi, li ekstaris de sia loko, ekvolis diri ion, sed nur balbuta krio eliĝis el lia brusto kaj rulfalis malviva sur la teron . . .

Kaj la feliĉo ankoraŭ tiel rideta alproksimiĝis al li, kisis lin sur lia alta frunto varmeta kaj gaje forpasis pluen.

P. K. JAVOROV.

HAJDUTA KANTO.

Mi tagumas en angul'sekreta

Kaj noktumas por vagado preta.

Paĉjon, panjon mi ne havas:

Paĉjo por insulti,

Panjo por singulti . . .

Hej vi, mia

Bela mont' Pirino

Hej vi, nigra

Carigrada vino.

Mi batalas kontraŭ malamiko

Fratkondutas al bonul-amiko.

Eĉ gefratojn mi ne havas:

Frato — min laŭdadi,

Kaj fratin' — veadi . . .

Gustetrafa

Vi pafilo eta,

Kaj brulgusta

Odrinbrando neta.

Dio dias — lasu ke li diu,

Reĝo reĝas, kiom daŭros tio?

Mi ne havas amatinon,

Kiu min ĉi horon

Atendu kun ploro . . .

Sabro mia

En la mond' unika!

Flekstalia

Knabin' Salonika.

Tradukis: S. D.

VL. KAMENOV.

FABELO PRI L'BLANKA KNABINO.

Kiam mi alvenis en la grandan urbon, estis aŭtuno . . .

Aŭtuno kun multe da radioj kaj multe da amo . . .

Aŭtuno, kies blankaj noktoj flustras fabelojn pri amo kaj feliĉo;

Kiu plenigas l'animon per vibrado, eĉ ĉe la tranquilla falado de l'folioj de la betulo

Kiu plenigas la koron per furiozaj entuziasmoj kaj ekdeziroj..

Kiam mi alvenis en la centmilan urbon, mi vidis knabinon kun grandaj enigmaj migdalkoloraj okuloj . . .

Okuloj, kiuj parolas rekte al la koro;

Okuloj, kiuj kvazaŭ ĵetas sagojn;

Okuloj, kiuj enigme subigas kaj kvazaŭ malfermas ian abismon inter la marŝado kaj la revo

Grandaj, enigmaj, majestaj migdalkoloraj okuloj . . .

*

Ne pasis multe da tempo kaj mi estis feliĉa:

Mi kisadis la grandajn okulojn;

Kisadis la blankajn manojn;

Kisadis la sangruĝajn lipojn;

Karesadis la belan hararon;

Ebriiĝadis pro la rigardo de l'knabino, kiun mi renkontis tiun ĉi aŭtunon.

Ne pasis multe da tempo kaj mia animo kantadis nur kantojn pri la juneco, pri nia amo, pri nia feliĉo . . .

. . . Niaj animoj sin banadis en revoj, kaj ĉiu vibro estis feliĉo por ni . . .

*

Sed alvenis malgaja tago . . .

Ŝi foriris ien al nordo. Poste mi forveturis al sudo . . .

Kaj kiam mi revenis en la centmilan urbon, ŝin mi ne trovis . . .

Ŝi ne estis reveninta.

De tiam, kiam ekiris ega amaso sur la larĝaj bulvaroj de l'urbo, mi ekrigardis la homojn, eble ŝin mi vidis.

Kiam mi ekrankontis junan fraulinon, similan al ŝi, mi fiksis mian rigardon je ŝiaj okululoj, por vidi, ĉu ili ne estas kiel la ŝiaj.

Kiam mi ekaŭdis laŭtan ridon de knabinoj, kvazaŭ mi ŝian ridon aŭskultis;

Kiam mi ekvidis knabinon kun bela hararo kaj blanka vi-
zaĝo, la koro ekstremetis ĉe rememoroj pri ŝi . . .

De tiam miaj koro kaj okuloj ĉiam ŝin serĉadis . . .

Kaj tago post tago forflugadis . . .

De tiam mi ne vidis mian knabinon . . .

Mia animo bruladis en sopiro, En ĝi mi starigis karan
oferejon.

Kaj kiam la nokto etendiĝis sur la urbon, mi tranĉvile
preĝis al mia oferejo — eble mi vidos ŝin . . .

Sed ne okazis tiel . . .

Kaj mia animo ploradis pro ĉagreno al la blanka knabino . .

Kaj tago post tago forflugadis al la nekonata kastelo de
la eterneco . . .

La flamo de mia oferejo estingiĝadis . . .

Kaj kiam la aŭtuna vento ekludis sur la branĉoj de l'bel-
kreskaj betuloj kaj ĉiu folio senbrue sin deŝiradis, kiam dum
ĉiu nokto super la lacigita urbo la nebulo tavoloadis sian grizan
mantelon, kiam aro da sovaĝaj anasoj forflugis kun ĉagrena grako
al sudo, kvazaŭ io sin deŝiris de mia koro . . .

Mi ekmemoris ŝin . . .

Iun tagon pensante pri ŝi, sur la pordon de mia domo iu
ekfrapis . . .

Saman momenton la pordo malfermiĝis.

Komence mi vidis la ombron de l'knabino, poste mi vidis
la samajn migdalkolorajn okulojn . . .

Ŝi alpaŝis al mi angore, angore. Kaj ŝi demandis min, ĉu
mi ne konas ŝin

Ŝi etendis brakojn por ĉirkaŭpreni min.

Mi ŝin rigardis mirigite. Mi ne kredis miajn okulojn.

En tiu momento kvazaŭ io disŝiriĝis en mia koro. Miaj
okuloj malheliĝis.

La pordo facile fermiĝis

La alian tagon mi ricevis sciigon.

La morto prenis en sian glacian faŭkon ankaŭ ŝin . . .

Ekstere tranĉvile sin tavolois neĝeroj kaj en ilia senparola
ludo fandiĝadis mia ĉagreno al la blanka knabino kun migdal-
koloraj okuloj.

Tradukis: ST. MASEROV.

AŬTUNA TRAGEDIETO.

Septembra tago. La ĵus malleviĝinta suno direktis siajn lastajn orkolorajn radiojn por orumigi la modestajn domojn de la malnova urbo. La vespero alproksimiĝis malrapide, sed certe Malvarmeta vento de tempo al tempo ekblovetis, kvazaŭ intence por antaŭdiri al la homoj, ke ne tre malproksime estas ankoraŭ la frosta vintro.

Sur benko, en arboriĉa parka aleo estis eĉ de malproksime desegnitaj du figuraj sidantaj unu ĉe alia tre proksime.

Laŭ iliaj parolmaniero kaj intimstato oni tuj povis konkludi, ke ili estas geamantoj.

La virino, kies mieno aspektis tre seri za kaj ŝajne pli juna ol la viro, parolis tiel malŝute kaj sufluke, kvazaŭ flustre:

— Kara, vi tre bone sciis — diras ŝi — ke mi estas edziniĝinta kaj ke mia edzo ankoraŭ estas vivanta.

— Vivanta, Vivanta! — interrompas ŝin la viro. Vere vivanta, tamen lama! Kiam vlor n h v s viro, kiu ne kapablas labori kaj kontentigi la ĉiutagan ekzistadon de tiel bela kaj juna virino, kiel vi! Mi ja tre bone sciis, ke vi ambau laŭleĝe estas geedzoj, sed tio ankoraŭ ne signifas, ke vi miope devas obei al la terura sorto por malsati dum tuta via surtera vivo, nur pro tio, ke iam vi, ne supozinte la h diaŭ n staton, kiun oni tre malkaŝe povus nomi mizera, vi konsentis edziniĝi kun li. Pardonu min! Mi tute ne intencas ofendi vin, ĉar ja vi sciis, ke mi sincere amas vin.

— Sed, pro Dio! Diru al mi, kion fari? — singultas ŝi — diru, ĉu post trijara geedza ideala kunvivo nun mi devas perfidi lin?

— Perfidi?! Kion vi parolas? Aŭ vi forgesas, ke ni estas geamantoj kaj eĉ antaŭ via edziĝo?! — Li eĉ tute ne konis vin, kiam ni jam estis geamikoj, kaj nur pro sorta hazardo vi estiĝis geedzoj. Do, fidu al mi, mia kara. Mi certigas vin, ke ni ambau estos tre feliĉaj! Jen, post tri horoj estas vagonaro, per kiu ni povus tuj forkuri.

— Forkuri? Sed, tiel neatendite! Ĉu morgaŭ ne estus eble fari tion? Dume mi penas min bone ekipi.

— Nun, kaj nur nun! Ja tiu tempo estas la plej konvena por realigi nian celon. Eble morgaŭ estus tre malfrue. Fiduu al mi!

* * *

La argenta luno jam estis aperinta sur la ĉielo, kiam la du siluetoj subbrake kaptitaj, sin ekstremis tra la senhoma aleo kaj malaperis en la mallumo.

* * *

Nur tridek ses horojn pli malfrue, la vendistoj de la loka urbaj ĵurnaloj disaŭdigis la kuriozan novaĵon, ke la invalido „X“ de la granda mondmilito, pro nesciata ankoraŭ kaŭzo sin mortigis per revolvero.

Iv. Kovaĉev

EUGEN RELGIS.

PARABOLO PRI LA HODIAŬA HOMO.

En la ĉefurbon de ĉiuj riĉaĵoj kaj de ĉiuj mizeroj — en la koron de la lando en kiu pulsadas tiom da aspiroj kaj tiom da suferoj — en la urbon de la laboro kaj de la diboĉo — malsuprenvenis iutage la Solulo de sur sia majesta monto fulmotondra.

Li venis por ekoni ankaŭ la homan vivon Por rekoni sian similulon. Por aldoni sian homecon — forĝitan tie sur montpinto — per lia volo kun helpo de instinktoj kaj de l'susuro de la prauloj vekigitaj dum longaj revadoj — al la suferanta kaj sian havenon serĉanta homaro.

Li venis por krei — por efektivigi sian homecon. En sia humilo li opiniis, ke li multon ne scias. La scienco lin ravegis. La amo lin vokis . . . La batakirlo lin logis . . .

Kaj li iris al la KLERULO: li opiniis lin la nova pastro de l' epoko — de l' animo, de l' menso kaj de la korpo. Li volis serĉi ĉe li lumon, la vorton vojmontran, la plencertecon.

Kaj lin akceptis la ĉionsciulo en ĉambro kiu ŝajnis esti konstruita el libroj.

Kaj demandis la SOLULO: — Kio estas la Homaro?

Kaj la Ĉionsciulo respondis: Estas organismo, en kiu ĉiuj eroj devas harmonii — kiel la dentradaro en maŝino. Jen... — kaj la Ĉionsciulo elprenis libron el la bretaro «Sociologio» kaj eklegis...

Kaj demandis la INDIVIDUALISTO: Kio estas la individuo?

— Estas ĉelo el la organismo. Li nepre devas aŭskulti la postulojn de la Socio; esti laborema formiko en la labirinta formikejo; ordnumero inter la sennomaj kaj disciplinaj milionoj.... kaj li elprenis libron el la bretaro «Moralo» kaj eklegis.

Kaj demandis la OPTIMISTO: — Kio estas la progreso?

— Ĝi ne ekzistas! La homo estas ĉiam kaj ĉiam la sama bruto mortiganta sian similulon, ŝteladanta, detruanta, kiu... kaj li elprenis libron el la bretaro «Historio» kaj eklegis...

Kaj demandis la PIULO: — Kio estas Dio?

— La religioj tenis la popolojn en nescio. Ili sufokis la vivon per la nebuleca vivo postmorta... Ekzistas tamen solsole Dio: la pura Racio . . . — kaj li elprenis libron el la bretaro «Metafiziko» kaj eklegis . . .

Kaj demandis la SPIRITUALISTO: Kiu estas la esenco de la vivo? Kio estas la animo?

— La atomo... altiro kaj repuŝo... La materio! la materio!.. Nia animo astas nur produktaĵo de la korpa laboro. Kune kun la korpo mortas ankaŭ la animo... — kaj li elprenis libron el la bretaro „Fiziko“ kaj eklegis.

Kaj demandis la LUKTANTO: — Kio estas la homa lukto?

— Struggle for life... Natura elekto... la rajto de l' pliforta... alsimiliĝo al la ĉirkaŭaĵo... — kaj li elprenis libron el la bretaro „Biologio“ kaj eklegis...

Kaj demandis la MEMFIDULO: — Kion mi devas fari?

— Aŭskulti la sentencojn kaj leĝojn kaj ordonojn starigitajn de Akademioj, de Parlamentoj, de Jarcentoj kaj de la Pli-multo. Kaj lerni, lerni... Penadi por ricevi la diplomon pri scio, pri saĝo, pri ordemo... La diplomo! lasta pruvo kaj premio!... — kaj li montris supren, sur la bretaroj, sian dekduon da diplomoj.

Kaj la HOMO timigite rigardis la Ĉionsciulon. Poste, li iĝis grava: Li sentis ke lia unueco estas sendifekta. La vero trovita post fosado de lia interno, tie — sur la suprega punkto de lia volo — kaj kiun confirmis la Naturo, la eterna universa harmonio — kriis al li sian internan realcon. Kaj li estis fortigita de ĉiuj vivaj fortoj — neŝanĝitaj de la abstraktaj monstroj, de la artefaritaj fataloj.

Kaj la Solulo fikse rigardis la Ĉionsciulon: la varmega Intuicio traboris la glacian Racion.. kaj la scienculo eksentis la krean Forton kiu estis invadanta ondon post ondo la senfruktajn rokojn de la Dogmo... Sed li povis ankoraŭ kontraŭparoli:

— Kio? Ĉu vi ne kredas? Ĉu vi ne kliniĝas antaŭ la vero starigita de Akademioj, de...

Sed la HOMAMANTO melankolie ridetis...

— Kio? Ĉu vi kuraĝas malrespekti la civilizon forĝitan per scienco?

Sed la SILENTULO kuntiris siajn brovojn: lia silento parolis... Sed tiu ne komprenis:

— Parolu do, eldiru viajn opiniojn!...

Silento, silento... Kaj la homeco de la Silentulo elverŝiĝis per la okuloj, per la spirado. Kaj sur la frunto profundiĝis la vertikala fosaĵo de la vivpensado; kaj liaj lipoj kuntiriĝis pro la maldolĉo de la nekomprenata amo... Kaj liaj fingroj tremadis: — ili volis karesi la fraton kiu estis mortiginta sian homecon por fariĝi ĉionscia.

Sed je lia amogesto tiu rapide flankeniĝis:

— Frenezulo! frenezulo! frenezulo!... — kaj vokadis la helpon de la Socio.

Sed la SOLULO insistis:

— Frato! Ĉu vi ne SENTAS mian amon? Ĉu vi ne volas ke unuigu la lumo de mia konscio kun la lumo de via scio?

— Frenezulo! frenezulo! helpon!...

Sed la ELTENANTO insistis:

— Frato! Ĉu vi ne SENTAS ke la vero de mia koro povas kompreniĝi kun la vero de via cerbo? Mia emado kun via prudento?

— Frenezulo! helpon! helpon!

Sed la JUNULO insistis:

— Frato! Ĉu vi ne SENTAS ke la mondo nun renaskiĝas, — post la ruĝa diluvo? Ke la Spirito venkis la Materion... Ke la mondocentro troviĝas en ĉiu homo... Ke la Ideo devas esti Ago... Ke ĉiu aĝo devas esti viva... Ke en ĉiu homo estas dio atendanta sin s'nvualigi antaŭ tiu kiu lin serĉas...

— Helpon! helpon! helpon!... — kaj la Socio venis helpi la Ĉionsciulon. Ĝi volis ligi la frenezulon.

Sed la HOMO haltigis ĝin per gesto de senfina mildo — per rigardo dolore larma — kaj eliris el la sanktsankta biblioteko... el la apoteko de la Racio plena de ĉiaj mirkuraciloj...

Kaj li malsupreniris en la oceanon de la Vivo, kun abismoj kaj lumturoj. La Solulo malsupreniris inter la homojn. Li portis en si la mondon kreitan de li, tie — sur la monto. Kaj li komencis LUKTI inter la homoj kiuj serĉadis vanan saviĝon en la arego de ŝajnaĵoj... Li volis montri al ili la unuan realecon: tiun de la Spirito, — kaj la unuan konon: la sinkonon...

... Kaj ĉiam li luktas kaj kreas. Li fidas je si kaj je siaj blindigitaj homfratoj... Li ekrias sian veron kaj altigas sian faron — tributo de lia ekzisto — sub la harmonioj eternaj...

Li laboradas, laboradas, laboradas...

Kaj ne demandas sin ĉu li finos — ĉu li venkos... Ĉar sian idealon li efektivigas momenton post momento, geston post gesto, vorton post vorto. Lia idealo kreskas kiel viva estaĵo — en lia propra enkorpiĝo... Per li vivadas NUN la estonta harmonio de ĉiuj homoj kiuj venkis sian nehom kon kaj konas sian diecon...

Premiita en la XIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj.



La arto de Boris Georgiev.

Post kelkara travivo kaj perfektigado en okcidento, post siaj sukcesoj en Italujo — la lando de l' arto, pasintan vintron en sian patrujon li — la granda bulgara pentristo Boris Georgiev revenis por alporti al siaj samlandanoj la plej belajn fruktojn de sia spirito, iom da ekscito al la belo kaj vero.

Boris Georgiev havas sendube multe el la kvalitoj de l' grandaj majstroj — rilate la teknikon — kaj kune kun tio, profunda neektuŝitan intuicion. Ido de praforma raso, li harmoniigas en si la indecon de la primitiva spirito kun la riĉo de kolektita jarmila sperto. Lia arto kvazaŭ estas triumfo de ĉiuj gajnitaj ĝis nun eblecoj kaj samtempo esprimas de ŝia antaŭhistoria prakreaĵo. Ne enirante en kontraŭdiro kun la klasika „muda“ arto, li faras tutan aliigon, enportante novan koncepton en la nuntempan arton. Kaj sendube lia influo kreskas ĉiam pli kaj pli, ĉar ĝi estas rezulto de la nove naskiĝanta kulturo.

Tro migrinta la landojn de l' malnova mondo kaj spirinta polvon de multaj entombigitaj kulturoj, li estas atinginta, laŭ profunda subkonscia vojo ĝis plenveraj, firmaj prafundamentoj de l' arto, kiel la multsciuloj de l' antikva Ateno konis la misterojn de la vivo en la aŭguristaj san-tejoj de la malnova Egipto. Kun la skeptiismo de iu Toma li estas enmetinta sian fingron en ĉiun vundon kaj dank' al longa sperto kaj vidad', li ekkonis la mensogecon de ĉiu skolo.

Samiel la ekspresionistoj, B. Georgiev malrespektas la mason. Ĉar la maso estas, kiu nin alnajas al la tero, ĝi estas, kiu kaŝas de ni la nemezureblajn kampojn de l' spirito, kaŝas la ondojn de tiu maro de mallumo kaj senmoveco. Kaj li venkas ĝin tre simple — ĝin ignorante. Anstataŭ ĝi, kiel esprimon de movo, li prenas la linion. La linio estas, laŭ filozofia vidpunkto, egal-signifo de la senfino. Ĝi ĉiam kondukas trans la horizonton kaj tiesie ĝi finiĝas, komenciĝas la eterneco. Finfine, la linio estas la unua kondiĉo por libero, ĝi donasflugilojn al la spirito kaj ĝin kondukas sur la zigzagaj vojetoj de ia supera harmonio.

Sed evidente kaj sendube al li estas flustrinta tiun ĉi misteron la trio de la senmortaj majstroj de Italujo: Sandro Botičeli, Filipino Lipi kaj Benoco Voroci... En tio ĉi nome kuŝas la enigmo de lia arto. Kaj ĝi estas samtempo, kiu aldonas al tiu ĉi arto ĝian senfinan purcon. Alia specifaĵo de lia arto, kiu nature eliras el la neo de la maso (tamen ne ankaŭ de la formoj) tio estas la senfortigo de la kolorilo kiel materio kaj alkonduko de la tonoj al plej granda ebla facileco kaj travidebleco. Tielmani reliea arto nerimarkeble transiras de videbleco en miraĵon, en ian agrablan sonĝon, en vizion — komencas vivi en tempo. Tio es-

tas arto tiom simpla kaj homa, ke fariĝas komprenebla por la infanoj kaj paŝtistoj, kaj samtempe, tiel malsimpla en siaj pure teknikaj detalaĵoj, ke kiam la homo rigardas ĝin, li sentas ĝojon kaj facilecon.

Boris Georgiev havas spiritan komprenon pri la vivo. Por li la vivo estas la videbla reveliĝo de la unusole ekzistanta spirito de la universo. Li amas ĉiujn vivantajn estaĵojn kaj ilian komunan esencon, kiu reveliĝas en ili nur en diversaj formoj. Kaj kiam la mano moviĝas pro tiaj komprenoj kaj sentoj por esprimi tiun ĉi plej radikalan el ĉiuj mondrigardoj, la pentristo enmetas en ĝin sian talenton tiam koroj, en kiuj la deziro al vero kaj amo ne ankoraŭ estingiĝis, ĉiuj vibroj, kiuj povas percepti la plenumiĝon de supera devo, kolektiĝas en la pentristo kaj al la jam aliĝintaj al li vibroj, ĉar ĉiu servado al eternaj idealoj, al vero, havas sian allogantan forton, havas voĉon, kiu krias kaj al kiu la konsciencoj nerimarkeble respondas.

En la arto de B. Georgiev estas travidebla ia tranĉvila kaj paca eksvingo, aŭdebla voĉo, kiu „vokas kaj gloras Dion“ — ankaŭ la florojn, samkiel la bestojn kaj la infanojn. Kaj kiel ĉiam okazas al ĉiu spirito, atinginta tiom multe en la batalo kontraŭ la teraĵoj, ĉe li ni vidas la malĝojon al ti-kiu ĉiam restas por la homoj neatingita revo. La Budha'a mondrigardo pri la viva ligo de l' homo kun ĉiu alia tera estaĵo estas penetranta en lian arton. Tio estas speciale konstatebla en „Parenceco“, kie la kapreolo kaj la infano aspektas efektive infanoj de unusama patrino — la naturo.

Kiu estas vidinta lian „Parencecon“, lian plenan je Isaeva amo „Erarvaganta paŝtisto“, ne povas ne konvinkiĝi, ke nur koro kaj mano, en kiuj bolas la senlima amo al ĉiuj estaĵoj, kapablas ilin krei. Tia delikateco kaj pureco ne povas alimaniere esti kreitaj, ĉar la admirinda fluo de l' vivo ne povas ŝpruci en ŝtopita por la amo koro.

Tradukkompilis: **St. Maserov.**

Ĉu vi estas membro de via loka societo?

Ĉu vi aligis al la Asocio?

Se ne-aligu kaj subtenu la Asocion!

Neniu for de nia movado!

ESPERANTISMO.

AL KIU PROPAGANDI ESPERANTON.

La unua kaj ĉefa devo de ĉiu vera esperantisto estas kaj devas esti: perfektigi en Esperanto, t. e. atingi tian staton de perfekteco en la lingvo, kiu permesos al li: parolante, flue kaj korekte esprimadi sin kaj verkante, liberigi sin de la influo de sia gepatra lingvo. Ĉiu esperantisto, por esti rajte nomata mezbona, devas scipovi la lingvon tiagrade, ke li povu, almenaŭ ĉe esperanta parolado aŭ skribado plene ignori sian nacian lingvon kaj pensi rekte en esperanto. Nur tielmaniere estas eviteblaj la netaŭgaj por esperanto naciismoj kaj aliaj lingvaj malkorektaĵoj.

Bedaŭrinde, mi konstatas, ke ni konstante kaj tro multe klopodas por varbi novajn adeptojn, sed iom malatentas la perfektigon de la malnovaj, jam varbitaj kaj konvinkitaj por Esperanto. Ni tre multe zorgas akiri novajn esperantistojn, sed ni malzorgas la akiritajn fari esperantistojn en vera senco de la vorto.

Ni ĉiam malfermas kursojn por komencantoj — eble kelkaj centoj da ili jam estas okazintaj, ni vendas grandan nombron da lernolibroj — dekojn da miloj — kaj la rezulto? Tre limigita kompare al la faritaj klopodoj nombro da tutbone kaj senĝene scipovantaj la lingvon esperantistoj.

Ankaŭ rezulto estas, ke nun ni havas hontigan kvanton da abonantoj por nia organo; rezulto do ankaŭ estas, ke nia asocio havas tiom da membroj, ke ni serioze nin demandas, kiel savi ĝin de pereco. Kaj ĉu ankaŭ ne estas rezulto, ke nun, anstataŭ havi milojn da membroj, ni havas la fondon „Savo“? Kaj kie restis do ili, la miloj da pripropaganditaj kaj eble finintaj la kursojn novaj adeptoj? Ili ja estas konvinkitaj pri la utileco de esperanto — pro tio ili studis ĝin — sed kial ili ne abonas nian organon, kial ne partoprenas aktive en la movado? Ĉar ni estis sufiĉe bonaj por instrui al ili la elementajn regulojn de la lingvo, sed ni ne penis, ke ili perfektigu en ĝi. Ni montris al ili la rektan vojon al nia idealo, sed ni ne finedukis ilin esperantisme, t. e. ke ili devas seninterrompe perfektigadi en, labori kaj oferi por esperanto. Post la fino de la kursoj ni lasis ilin al iliaj propraj fortoj kaj ili eble ne trovis sufiĉe da tiuj por atingi kaj sekvi nin.

Do, jen koncize kion mi celis per ĉio supredirita: mi opinias, ke saman parton, se ne pli grandan, de nia atento ni devas dediĉi al tiuj konvinkitaj kaj gajnitaj por esperanto kursfinintoj, fari ilin veraj, taŭgaj esperantistoj, ne nur partoprenantaj la movadon, sed ankaŭ laborantaj intense por ĝia venko, oferante siajn energion, tempon kaj monon. Ili devas konvinkiĝi pri tio. Kaj estante tiaj, ni ne plu bezonos demandi pri la savrimedoj. Ni devas zorgi, ke tiuj miloj da lernintaj Esperanton aliĝu al nia asocio. Tiam ĝi estos forta kaj floranta. Por atingi tion, ni malfermu saman kvanton da kursoj por progresintoj kiel por kome-

cantoj. En la kursoj ni ne instruu al ili nur la lingvon, ne, prefere ni instruu ilin pri la esperantismo, pri la devoj de la veraj esperantistoj. Regajni la malnovajn samideanojn kaj organizi flanketarantajn lernintojn de la lingvo, devas esti la nuna nia ĉefa tasko. Klopodante por granda kvanto, ne forgesu, ke la kvalito estas ĉiam preferinda!

La dua, iom malpli ĉefa devo de la vera esperantisto estas: propagandi la lingvon inter neesperantista publiko, esperantistigi la neesperantistojn, alivorte, fabrikii novajn samideanojn. Feliĉe, tiu devo estas konsiderata de ĉiu iom konscia esperantisto.

Estas malnova, bone konata de ĉiuj vero, ke la nova adepto de nia ideo samtempe kun la lingvo, akiras ankaŭ la manion esperantistigi, Bonveninta manio! Sed tamen... jes, se ne ekzistus, sed „tamen“ kaj „se“, ĉio estus tute alia.

Sed tamen...?

Do, ni propagandas! Ni propagandas grandstile, fervore, tiel, ke dum la verdaj semajnoj Esperanto havas lokon en ĉies buŝo, sed bedaŭrinde... ne en ĉies cerbo. Pasis la propagandperiodo for, malfermiĝas la kursoj. Kaj la rezulto? La rezulto estas mono prenita el la kursanoj, kiu apenaŭ sufiĉas kovri la propagandel-spezojn. Se estas mongajno ni kompreneble ĝojas. Se ne estas, ni priĝojas la moralan gajnon. Kaj tiu lasta? La kursoj funkcias. Bone kaj fervore gvidataj. Iom post iom la nombro de la kursanoj duoniĝas; finas la kurson nur la triono de la komencintoj. Tio konstante okazas: ni ne povas ĝin nei. La finintoj de la kurso, se ne estas tuj aniĝintaj al la societo, baldaŭ forgesas ĉion lernitan kaj la morala rezulto estas, ke 2—3 personoj fariĝas aktivaj esperantistoj kaj penas funde ellerni la lingvon. Sed ili havas danki tion al siaj propraj fortoj. Kaj la vasta publiko, post tiom da bruoj kaj tumultado, baldaŭ forgesas eĉ la ekziston de Esperanto.

La rezultoj de tiom da fervoro kaj klopodoj niaflanke estas kelkaj veraj esperantistoj kaj kelkdekoj da eterne „novaj“.

Kion do mi celas diri? Ke tia propagandmaniero ne estas laŭcela, ne estas, taŭga, prudenta?

Ne, mi ne celas tion diri. Ĝi ja estas taŭga kaj prudenta, bone efikas kaj devas esti plu daŭrigata. Mi nur volas atentigi vin pri tio, ke ni devas peni eviti tiun mizeran rezulton, el tiom da propagando havi pli brilan sukceson.

KIAMANIERE?

Esperanto estis kaj estas tiom multe kaj tiel efike propagandata, ke hodiaŭ en la tuta civilizita mondo inter la intelektularo preskaŭ ne troviĝus persono, kiu ne scias la vorton „esperanto“ kaj ties signifon. Do, la vasta publiko scias pri esperanto kaj ĝia valoro, tamen... ĉu ni ne devas iom mirigite konstati, ke ĝi ne rapidegas esperantistigi?

Ke ĝi ne rapidegas, estas konfesota de ĉiu el ni fakto. Tiun fakton alportis al ni la lasta tutmonda statistiko. Sekve: ni propagandas al scianta pri Esperanto publiko.

Ni propagandas senelekte kaj senescepte al ĉiuj. Kaj ne ĉiuj venas ĉe ni, ne ĉiuj konvertiĝas. La vasta publiko estas sufiĉe informita pri esperanto kaj spite tion ne venas ĉe ni grandamase. Ĉu tio ne devas igi nin pripensi, ke propagando al specialaj elektitoj, pri kiuj ni certas, ke ili fariĝos bonaj esperantistoj, estos pli fruktodona? Tiuj „specialaj elektitoj“ ja tute ne mankas. Ili eĉ estas tre granda nombro. Tio estas la homoj, kiuj pli idealeme konceptas la mondon kaj vivon. Lasu vi la homojn praktikajn, dediĉintajn tutan sian vivon al monfarado, lasu vi la aferistojn, kiuj el ĉio nur profiton serĉas. Ili ne havas tempon por esperanto kaj lernos ĝin nur tiam, kiam ĝi estas parolata de milionoj. Lasu la praktikulojn, la monhomojn kaj profitemulojn. Idealismo naskis Esperanton, idealismo ĝin nuntempe subtenas kaj nur per idealismo ĝi venkos.

Ne imagu kaj ne kredu, ke senescepte ĉiuj homoj havas la kapablon lerni kaj posedi fremdajn lingvojn. Mi ne aludas la simplulojn, kiuj vivas tute senzorge pri ia gramatiko kaj ne demandas sin, ĉu ili bone posedas eĉ la gepatran lingvon. Memkompreneble, tiuj homoj estas perditaj por esperanto ĝis kiam ĝi ne estas parolata ĉe ĉiu stratangulo. Ne, mi aludas homojn vere inteligentajn, sufiĉe klerajn, kiuj tamen ne kapablas lerni aliajn lingvojn eĉ ĉe plej granda deziro, simple pro tio, ke ili ne havas talenton. Inklino kaj kapablo al lernado de lingvoj estas samtiel talento, kiel pentri aŭ muziki bone.

Do: ni ne devas vane foruzi niajn fortojn por konverti homojn, kiuj neniam scipovos bone esperanton, ĝis la lasta troviĝas en tia stato, kiu permesas nur ĝian teoriantinstruadon en la kursoj, sed neniel ĝian praktikadon ĉiumomente, en la ĉiutaga vivo, tiel, ke ĝi povu tute bone anstataŭi la gepatran lingvon. Ne, la nuna stato de disvastiĝo kaj aplikiĝo de esperanto ankoraŭ ne permesas ĉi tion.

Ni konfesu: la okazoj, kiujn ni havas por paroli esperanton sur la stratoj, estas tre maloftaj. Eĉ en niaj kunvenoj ni ne faras ĉi tion. Sekve: ni ĉefe kaj fervore propagandu esperanton al tiaj personoj, kiuj havas ne nur la emon, sed ankaŭ la kapablon post la fino de l' kursoj daŭrigi la lernadon ĝis perfektigo nur per librolegado kaj tre malofta parolado. En la kursoj oni ne povas kaj ne devas peni finlerni esperanton. En ili estas donata nur la fundamento de la lingvo kaj ankaŭ la instigo al plua, postkursa lernado.

Al kiuj ni ankoraŭ ne devas propagandi esperanton? Kaj ne nur ne eldiri antaŭ ili la vorton „esperanto“, sed zorgi, severe zorgi, ke ili nepre ne eniru niajn vicojn. Al tiaj personoj nome, kiuj, estante eĉ bonaj lingvoposedantoj kaj batalantoj por esperanto, ne povas plene liberigi sin de la pasio politikadi. Kiuj ne povas kompreni, ke esperanto ne povas kaj ne devas esti kunligata kun ilia politikemo kaj neniel bezonas esti kondukata „dekstren“ aŭ „maldekstren“. Komprenu do, semideanoj, ke kia ajn politikemo via povas alporti kaj alportis nur malbonon, gran-

dan malbonon por nia movado. Nia asocio gardas severan ne-ŭtralecon, kaj ĝiaj membroj, ĉiuj esperantistoj estas devigataj ĝin gardi. Kvankam la asocio ne respondecas pri la politikagoj de ĉiu aparta membro ĝi tamen jam estas suspekteme konsiderata kaj iom kompromitita. Estu do politikantoj, se plaĉas al vi, sed kiel civitanoj, neniam kiel esperantistoj.

Se ni nun resumos ĉion diritan pri: al kiuj ni devas iom propagandi; al kiuj nur menciigi aŭ rememorigi la ekziston de nia lingvo; pri kiuj ni povas ankaŭ ne zorgi, konsiderante ilin ĝis certa tempo perditaj por esperanto, kaj al kiuj ni devas nek elparoli la nomon de nia lingvo, konsiderante ilin ne nur senutilaj, sed tre ĝe danĝeraj — ni vidos, ke la nombro de la homoj, kiujn ni devas senĉese pripropagandi, energie konvinkadi, instruadi pri la lingvo kaj eĉ, pli grave, edukadi esperantisme, fariĝas tre limigita. Vere, sukcesinte gajni ilin ĉiujn, ni estos malmultaj laŭkvante kompare al la cetera publiko, sed kompanse: laŭvalite ni estos perfektaj. Kaj tiam ni povus kredi esti atingintaj nian idealon, ĉar ni estos potencaj.

Antaŭ ol montri la manierojn kiujn mi opinias iom laŭcelaj — ĉar vere efikantan, plej taŭgan kaj laŭcelan mi ne scias — mi deziras diri kelkajn klarigajn vortojn pri mia aserto, kiu eble miretigis vin, ke ekzistas homoj kiujn ni malmulte devas zorgi gajni por esperanto.

Unue: diversocaj praktikuloj (la gazeto „Esperanto“ havas nur unu „paĝon de la praktikulo“): riĉuloj havantaj sufiĉan monon kaj kleron por lerni „utiligeblajn“ modernajn lingvojn; homoj, redirite, dediĉintaj tutajn siajn tempon, energion kaj kapablojn por monfarado, t. e. la orboviduloj. Por ili la tempo estas mono kaj esperanto nlerninda, ĉar ĝi ne signifas mongajnon, sed kontraŭe, monoferon. Mi ĝenerale konstatas, ke ili ne emas lerni nian lingvon, sed se ili hazarde konvertiĝas, kompreneble, ni devas bonvenigi ilin en niajn vicojn. Ja nura kaj nuda idealismo ne sufiĉas en nia tempo.

Due, la homoj, al kiuj mankas sufiĉa kapablo aŭ intelegenteco por ellerni la lingvon. Kvankam dekfoje — kaj eble pli — pli facila ol ĉiu ajn ekzistanta lingvo esperanto tamen estas lingvo kaj eĉ tre perfekta — por ne diri la plej perfekta, kiel mi emas — kaj ĝia lernado bezonas konsiderindan dozon da lingvokapablo kaj intelegenteco. Se ĝia gramatiko pro sia simpleco kaj logikeco, pro sia jam proverbiĝinta regularo sen esceptoj estas ellernebla dum mallonga tempo, la vortradikaro tamen nombras kelkmilojn, kies ellernado bezonas ne nur kapablon sed ankaŭ fervoron kaj persiston. Kaj konfesu vi do, spertaj esperantistoj, kiom da ankoraŭ nun ne sciataj de vi best-kaj kreskaj nomoj havas la vortaro. Ĉu vere vi neniam demandis vin, kial esperanto havas relative malgrandan nombron da adeptoj kompare al aliaj kulturklerigaj movadoj kaj ismoj, kvankam ĝi estas la plej valora el ĉiuj?

(Daŭrigota).

За българо-есперантски речникъ.

Отъ день на день нуждата отъ единъ добъръ българо-есперантски речникъ се чувствува все по-силно. До сега ние не сме имали задоволителенъ такъвъ речникъ: онзи въ отдавна изчерпаното „Мапокондуко“ на Хр. Поповъ и Г. Орѣшкавъ е една отживѣла работа, а „Пълниятъ“ речникъ на Кръстановъ е толкова малъкъ и беденъ, че не може да задоволи дори нови есперантисти.

Въпросътъ е да се пригответи такъвъ речникъ е занимавалъ ръководителитъ на есперантското движение въ България. Още въ 1922 г. централниятъ комитетъ взе решение да се организира колективно изработване на пълненъ българо-есперантски речникъ отъ най-опитнитъ български есперантисти и възложи на едного отъ членоветъ си да организира работата. Въпоследствие това решение се оспори отъ другъ членъ на центр. комитетъ, който заяви, че самъ работи върху такъвъ трудъ и че, като така, най-целесъобразно е, да натоварятъ него съ задачата да организира изработването на речника. Ц. К. корегира решението си въ искания смисълъ, но отъ тогава минаха години и решението си остана мъртва буква.

Отъ две години върху такъвъ речникъ работи самостоятелно стариятъ есперантистъ Георги Атанасовъ. Въ началото той не възприе мнението, че такъвъ трудъ може да се извърши добре само съ колективна работа, обаче следъ повече отъ година упоритъ трудъ дойде до убеждението, че тоя е единствениятъ пътъ да се стигне по-бързо до целта и да се даде нѣщо хубаво. Направи се опитъ да се организира работата между нѣколко души, но още не е постигнато нѣщо въ това направление.

Между туй съидейникътъ Димитъръ Златарски (Miti) отъ Варна е започналъ самостоятелно изработването на също такъвъ речникъ и е напредналъ доста както въ събирането на материяли, тъй и въ съставянето на речника. Неговата мисълъ е, да се даде нѣщо съвършено: пълненъ българо-есперантски речникъ, много по-пълненъ отъ всички излѣзли до сега речници на български езикъ, който да служи дори и на неесперантисти като сборникъ на всички употребавани въ българския езикъ думи. Както е замисленъ, този речникъ ще бжде и илюстриранъ.

Такъвъ речникъ би билъ цѣло събитие за българското есперантско движение, далече надрастваще сегашния ръстъ на последното. Като зная голѣмата начетеностъ и интелигентностъ на Дим. Златарски, неговото дълбоко познаване на есперанто, неговата упорита, сериозна, системна и смислена работа, азъ не се съмнявамъ, че той ще може да доизкара наченатото дѣло. Намѣрението му, да го подложи на прегледъ и евентуално поправяне и допълняне отъ вещи есперантисти, усилва гаранцията, че това ще бжде нѣщо много

цѣнно. Цѣлата работа е, дали ще може да види бѣль свѣтъ такъвъ трудъ. Тамъ азъ се съмнявамъ. Залисани въ дребнавитѣ въпроси на деня, българскитѣ есперантисти едва ли ще оценятъ достойно, какво значение може да има за есперантското движение у насъ единъ такъвъ крупенъ фактъ, и едва ли ще направятъ жертви, за да осъществятъ издаването на тоя речникъ.

Речникътъ, готвенъ отъ Георги Атанасовъ. нѣма такъвъ широкъ планъ и е по-лесно да се издаде. Сигурно той ще бжде предчета на голѣмия трудъ на Дим. Златарски, чието издаване трѣбва да остане като близъкъ идеалъ на българското есперантство.

Понеже въпросътъ е отъ голѣмъ интересъ за всички български есперантисти, помолихме Д. Златарски да помѣсти за образецъ една малка частъ отъ труда си въ „Bulgara Esperantisto“. Той ни е изпратилъ частъта „Ю“, която помѣстваме въ настоящия брой. По техническа причини илюстрациитѣ не могатъ тукъ да се дадатъ.

Добре ще бжде, ако и Георги Атанасовъ даде за образецъ 1—2 страници отъ изработената частъ на своя речникъ, а сжщо и ако въпросътъ за изработването на такъвъ речникъ се разчепка подробно отъ всички заинтересувани и не слѣзе вече отъ сцената, докато не видимъ излѣзълъ на бѣль свѣтъ единъ хубавъ българо-есперантски речникъ.

А. Д. А.

Granda Bulgara-Esperanta vortaro de Dimitr Zlatarski

Kelkaj el la Mallongigoj (Abreviacioj):

a. adjekivo	прилагателно	kem. kemio	химия
abrev. abrevacio	съкращение	kom komparu,	сравни, срав-
ad. adverbo	наречие	komparativo	нит. степенъ
ang. angla	английски	kv. kvalifikas	квалифицира
ar. araba	арабски	lat. latina	латински
aŭg. aŭgmenta	увеличително	malnovb. mal-	старобългарски
bot. botaniko	ботаника	novbulgara	
dim. diminua	умалително	med. medicino	медицина
ekz. ekzemple	напримѣръ	militarto	военни науки,
fig. Fig. figure	образно, фигу-	miner. minera-	воен. терминъ
	ративно	logio	минералогия
fr. franca	френски	mit mitologio	митология
g. genro	родъ	mong mongola	монголски
geog. geografio	география	ned. nederlanda	холандски
ger. gerundio	действ. прича-	netr. v. netran-	непреходенъ,
	стие	sira verbo	
germ. germana	нѣмски	p. neŭtra sekso	срѣд. глаголъ
hebr. hebrea	еврейски	orn. ornitologio	орнитология
hist. historio	история	pal. paleonto-	палеонтология
id. idiotismo	непреводимо	logio	
int. interjekcio	междуметие,	pl. plura nombro	множ. число
	възклицание		
jur. jurscienco	правни науки	poez. poezia es-	поетиченъ из-
(K.) laŭ Kabe	споредъ Каве	primo	разъ
k. kaj	и, сжщо		

rus. popola parolo	нелитературенъ изразъ	sp. speco	видъ
pref. prefikso	представка	t. turka	турски
prov. provincismo	провинциализмъ	tr. v. transira verbo	преход. глаголъ
p.v. pasiva verbo	глаголъ отъ страд. залогъ	v. vira sekso	мъжки родъ
rel. religio	религия	V. Vidu	вижъ
rus. rusa	руски	V. geog. p. Vidu la geografian parton	вижъ географ. часть
r. v. refleksa verbo	възвр. глаголъ	V. hist. p. Vidu la historian parton	вижъ историч. часть
s. substantivo	существително	vn. virina sekso	женски родъ
sans. sanskrita	санскритски	vulg. vulgara	грубъ, просто-народ. изразъ
sc. sciencia	науч. терминъ	zool. zoologio	зоология
sin. sinonimo	синонимъ едно-значуща дума		
slav. slava.	славянски, черковнославянски		

Klarigoj

La vortaro enhavos da terminoj sciencaj: natursciencaj, medicinaj, teknikaj, religiaj, filozofiaj, matematikaj, muzikaj, k. a. Apud la botanikaj, zoologiaj, medicinaj k. a. nomoj estos donata la latina nomo.

La vortaro havos la plej necesajn klarigojn pri la bulg. kaj esper. vortoj kaj la plej necesajn ilustraĵojn, kiuj povos doni veran koncepton pri la priparolata objekto.

La vortaro enhavos duan, histori-geografian parton kaj same alian, trian parton, kiu entenos da esprimoj fremdlingvaj, uzataj diversokaze en la bulgara ligvo kaj literaturo.

Por kompili la vortaron, estas uzitaj la jenaj vortaroj:

Enciklopedia vortareto	Ch. Verax
Vortaro de esperanto	Kabe
Bulgarisch-deutsches Wörterbuch	N. Miladinov
Türkisch-deutsches Wörterbuch	Haski Tewfik
Руско-български речникъ	Д. Благоевъ
Русско-французскій словарь	И. Шмидъ
Есперанско-български речникъ	Х. Бъчваровъ
Музикаленъ речникъ	К. Богумировъ
Художественъ речникъ	Н. Райновъ
Речникъ на чуждитѣ думи	М. Московъ
Опредѣлитель на растенията	Ахтаровъ и др.
Ботанически опредѣлитель	Б. Лавидовъ
Българска бозайна фауна, Нашитѣ птици k. a. libroj, helpiloj, artikoloj pri diversaj sciencaj branĉoj.	

Estas enkondukitaj en la vortaron multo da novaj vortoj, ĉu sportaj, ĉu sciencaj, ĉu teknikaj aŭ ĉiutage uzataj, kiuj faros ĝin multe pli kompleta ol la konataj bulgaraj vortaroj por fremda lingvo.



Ю *n.* Ju. La 30-a litero en la bulgara alfabeto.

Ю! *int.* Hu! Krio por forpeli hundon, lupon, por esprimi malestimon aŭ por timigi, blami, moki, obstrukcii.

Ю аŭ **ЙУ** *v.* Ju'о. Ĉina mezurilo por volumeno k. enhabo.

ЮБИЛЕЕНЪ *a.* Jubilea, datrevena.

ЮБИЛЕЙ *v.*, fr. (el hebr. jobel: ŝafkorno, trumpeto, per kiu estis anoncata la sankta jaro, festata de la hebreoj laŭ la leĝo de Moseo post ĉiuj 50 jaroj kaj nomata same) Jbileo. Datreveno, ordinare post 25, 50, 100, 500 k. 1000 jaroj. Ĉe la katolikoj — plena kaj ĝenerala indulgo, absolvo, farata de la papo kaj festenata.

ЮБИЛЯРЪ *v.* Jubileanto, jubilefestanto, jubileulo, datrevenfestanto.

Юбиярна *вл.* Jubileantino, jubileulino, jubile-(datreven-)festantino.

ЮБРЕ к. **ЮБРЕЙ!** *int.* Hu! Hej! U-hej! Sin. **хубре, ху-брей.**

ЮВА *вл.*, t. Forlasita (senkontrola, vaganta, senpaŝtista, liderlasita) bruto aŭ (hejmbesto), paŝtanta sin tra la kamparo, en la arbaro. Fig. Vagulo, senkontrolulo, vagabondo (за мъжъ). Vagulino, forlasitino, vagabondino (за жена).

ЮБАРЛАКЪ *v.* t. V. **валянъ.**

ЮВАРЛАЧЕСТЪ *a.*, t. V. **валчестъ, обълъ, кржгълъ, топчестъ, овалень.**

ЮВЕЛИРСКИ *a.* Juvelista, de la juvelisto, juvelist-(кв. **ювелиръ**). Juvelaĵ-, juvela, juvel-(кв. **скъпоценностъ, ювель**).

ЮВЕЛИРСТВО *n.* Juvelarto, arto fari aŭ fabriki juvelojn. Juvelist-arto, juvelist-metio, metio de la **ювелиръ**.

ЮВЕЛИРЪ *v.*, germ. Juvelisto. Juvelvendisto.

ЮВЕЛЪ *v.*, germ. Juvelo, juvelaĵo. Sin. **скъпоценностъ, скъпоценненъ камъкъ.**

ЮВЕНАЛИИ pl. lat. Juvenaloj, junecfestoj, festenoj de la juneco (en antikva Romo).

ЮВКА *вл.* V. **юфка.**

ЮГИЧЪ *v.*, prov. Ŝafo-kondukanato, ŝafo-antaŭulo, ŝafo-) sonorilportanto, sonorilulo, ĉef-ŝafo. Sin **егичъ, водичъ.**

ЮГО *n.* malnovbulg. V. **нго.**

ЮГО-pref. Sud-. Sim. **южно.**

ЮГОВИТЪ *a.* (de **югъ**) Sudventa, sudventv-, varmventa. Юовито време. Sudventa vetero.

ЮГОЗАПАДЕНЪ *a.* Sudokcidenta.

ЮГОЗАПАДНО *ad.* 1. Sudokcidente. 2. Sudokcidenten (по посока къмъ Ю. З.), Ю. З. abrev. SO к.с. (S-O. ĝe la franca ouest, S-W. de la angla west: окcidento).

ЮГОЗАПАДЪ *v.* Sudokcidento. V. abrev. **ĉe югозападно.**

ЮГОИЗТОЧЕНЪ *a.* Sudorienta.

ЮГОИЗТОЧНО *ad.* 1. Sudoriento 2. Sudorienten (по посока къмъ Ю. И.). Ю. И. abrev. SOr. (S-E. de la angla east, ar. - germ. est: oriento).

ЮГОИЗТОКЪ *v.* Sudoriento V. abrev. **ĉe югоизточно.**

ЮГОСЛАВЯНИНЪ *v.* Jugoslavo, loĝanto de Jugoslavio. V. geog. p. **Югославянка** *вл.* Jugoslavino.

ЮГОСЛАВЯНСКИ *a.* Jugoslava. V. **Южнославянски.**

ЮГУРТЪ аŭ **ЙОГУРТЪ** *v.*, t. Jogurto (fr. yoghourth, yogourt; germ. Jogurt). Speco de acida lakto uzata de bulgaroj kaj turkoj, utiligata same en la medicino ĉe specialaj nutraj reĝimoj.

ЮГЪ *v.* Sudo. Ю. abrev. S.

ЮДА *вл.* 1. Driado. Sin. **самодива, самовила.** Arbara virino, ordinare malbonfara (mit.). 2. Sorĉistino. Sin. **вещица.** v. 3. Judaso. Sin. **Юда предателъ.** V. hist. p. 4. Turmentisto; maliculo. Sin. **мъчителъ, злобенъ човѣкъ.**

ЮДАИЗЪМЪ *v.* Judismo; judaismo (к.). Religio de la judoj.

к. т. р.

TRA ESPERANTUJO.

ENLANDA MOVADO.

Ruse. La Esperantista societo „SOLIDARECO“ en sia kunveno la 28. X. 1928 diskutis gravajn demandojn. Oni decidis, ke la verda semajno estu malfermata je la 11 aŭ 18 Novembro per publika parolado. Baldaŭ estas malfermotaj kursoj.

Sofia. La Sofia esperantista Societo dum sia jarkunveno, la 10-an de Novembro elektis novan komitaton konsistantan el jenaj personoj: Prezidanto - At. D. Atanasov, Vicprezidanto Hugo Bär, sekretari-kasisto - Dimitr Stajnov, Konsilanton: Bertha Marinova, Dimitr Stojanov, kaj rezerva membro Stefan Gančev. Kontrola komisiono: Velčev kaj Petr Mitkov.

Plovdiv. La 14-an de Oktobro la loka Esp-ta Societo »KULTURO« aranĝis jaran kunvenon en kiu, post la liberigo de la estraro kaj kontrola komitato, oni elektis la jenan novan estraron: Prezidanto — Srebro 'Petrov, vicprezidanto — B. Behar, sekretario — Iv. Ŝivarov, kasisto — inĝiniero Mjuler, bibliotekisto — T. Ajolov. Konsilantoj: P. Stoev (del. U. E. A.), Iv. Ĝorov kaj G. Ĵilkov. Kontrola komitato: T. Rojdoŭ, At. Cokov kaj V. Sasonov.

La adreso de la Societo: Iv. Ŝivarov. 134 „Karlovskaja“ — Plovdiv.

La kunveno decidis dankesprimi la sukceson dum la pasinta jaro ŝuldata al gesinjoroj Yelland el Londono kiuj gastis kaj efike propagandis en nia urbo.

Esp. movado tre vigla. Malfermita kurso por komencantoj en Esp. klubo bone vizitata. Kursgvidanto Iv. Ŝivarov. Baldaŭ malfermata kurso por progresintoj. Ĉiu alveninta esperantisto el aliaj urboj povas trovi samideanojn ĉiun dimanĉon je 3 h. posttagmeze en vegetara restoracio kie la lokaj esperantistoj kunveniĝas. La klubo estas uzata nur por kursoj.

Ŝumen. La 19-an de oktobro j. к. okazis komuna kunveno en kiu raportis la estraro kaj K. K. kaj la delegitoj de la bulg. kongreso — s-ro Silvestriev kaj de la universala — s-roj D. Kostov kaj P. Colov, post kio estis elektata nova estraro, konsistanta el:

Prezidanto Il. Silvestriev, vicprezidanto D. Kostov, sekretario P. Colov, kasisto Sarandev, bibliotekistino K. Todorova. Kontrola komitato: D. Angelov, K. Ĵelezarov kaj K. Bogotinska. Raportanto — N. Kocev.

Estas senditaj 1000 levoj por la eldono de la lernolibro, klubejo baldaŭ luota kaj kursoj malfermotaj.

Kunveno okazas ĉiuvendrede.

Sliven. La 28-an de oktobro 1928 la E-ta Societo »ESPERO« reelektis la malnovan komitaton nome: Georgi Dragoev — prez., f-ino Kirila Ŝejtanova — sekretari-kasisto, f-ino Tina Kolarova — bibliotekistino. Adreso: F-ino Kirila Ŝejtanova, str. „Patriarh Eftimij“ 37, Sliven.

Vraca. La Societo „SUKCESO“ en sia jar-unveno, kiu okazis la 5-an de oktobro, elektis novan estraron konsistantan el sekvantaj personoj: Prezidanto — Veljo Kutinčev advokato, vicprez. — Boris Nenčev, oficisto sekretario — Radoslav K. Tričkov, kasisto — Krum Ivanov, bankoficisto, bibliotekistino — Katja Minva. Kontrola komitato: Georgi H. Georgiev, Ivan Tasov kaj f-ino Mara Kovačeva. La societbiblioteko disponas 50 librojn. La societklubo estas malfermita ĉiumerkrede kaj dimanĉe. Baldaŭ organizota kurso.

v. **Dolna-Banja** (Ihtimana). Fondita nova societo „VERDA LUMO“. Prezidanto — T. St. Lazarov, sekretario — f-ino G. Zaharieva. La societo aliĝis al B. E. A. kaj pagis la membrotizon por 8 p.

EKSTERLANDA MOVADO.

Estonujo. Post la sukcesplenaj esperanto-kursoj de s-ro Andreo Ce (ĝenerala sekretario de I. C. K.) en Svedujo nun li gvidas kurson en Talin kun 100 personoj.

Polujo. La E-to movado en Polujo pli kaj pli estas atentigata de la ĉefdelegito de U. E. A. s-ro Ŝapiro. La tuta propagandeca forto estas ŝuldata dank' al naskiĝloko de nia Majstro. Pro la senlaca kaj efika propagando de la vigle laboranta por esperanto s-ro Ŝapiro, baldaŭ la rezultoj efektiviĝos enkondukante la internacian lingvon en la lernejoj.

Rumanujo. Constanca. Formiĝis esperantista grupo dum aŭgusto okaze la kursoj de T. Morariu el Cluj. La nova grupo nombras 2) membrojn. Estas elektitaj en la komitato jenaj personoj: Prezidanto kapitano G. Dobresku, vicprez. — D-ro B. Petrov, ĝenerala sekretario — Dimitr N. Minčev - oficiala aŭtoritato de Rumania E-to Societo, sekretario — S. Miga (studento) kasisto — M. Minasian (studento). Adreso: D. N. Minčev, str. St. Mahaileanu 18, Konstanca (Rumanujo).

Bukure^ato. Kursoj gvidataj per studentoj de medicino kaj en la komerca supera lernejo.

Hungarujo. En la kunsidoj de la Internacia Fremdultrafika kongreso, laŭ la oficiala propono de Italujo kaj Hungarujo, oni diskutis pri Esperanto kaj starigis la uzadon de internacia helplingvo en la interrilatoj kun la interŝtataj trafikoficejoj. Tre favore rekomendis esperanton la Direktoro de la Hungara Fremdultrafika Ligo, menciante la praktikan utilecon kaj bonajn servojn de esperanto.

Budapest. Bele situita sur la bordoj de Danubo estas loko de nia 21-a Universalaj kongreso. Ĝi okazos la 2—9 an de Aŭgusto 1929. Kongreskotizo 28 pengoj aŭ 700 levoj. La aliĝinto samtempe ricevas senpage „Hungara Heroldo“, organo de la 21-a kongreso de esperanto.

Leteroj kaj pagoj devas esti adresataj rekte al la kongresa adreso:

21-a Kongreso de Esperanto

Budapest (Hungarujo).

Anglujo. La Anglaj gesamideanoj invitis s ron Ivan H. Krestanov por publike paroli en ilia lando. Ĝis nun li faris paroladojn en pli ol 20 urboj kaj ankoraŭ daurigas ilin. Temas pri nia lando kaj popolo (bulgara). Bona Komenco por internacie ŝanĝi oratorojn kiuj estos plej bonefikaj propagandiloj por nia movado.

SCIIGOJ.

El la redakto.

La redakcio petas pardonon pro la multaj allasitaj preseraroj en la 1-a numero, malgraŭ sia penado laŭeble eviti ilin. Kulpas pleje la nesperta kaj nekutimiĝinta al esperanto presisto. Ĝi faros ĉion eblan kaj severe zorgos, por ke estonte ne plu aperu ĉiaj aĵoj preseraroj aŭ lingvaj malkorektaĵoj.

La redakcio sciigas ĉiujn sendantojn de manuskriptoj kaj artikoloj, ke la lastaj ne povas esti resendataj. La verkantoj mem estas petataj skribi sur unu flanko de l' listo kaj konservi kopion. Duflanke skribitaj manuskriptoj ne estas presotaj. Kune kun la traduko sendu la originalon.

El la kancelario.

La centra komitato petas la societojn kaj apartajn esperantistojn sendi kiel eble plej baldaŭ monon por ke la afiŝoj por la verda semajno estu ĝustatempe presitaj.

La tempo ne permesas prokraston.

La sesa eldono de Ada — lernolibro estas jam presata kaj baldaŭ sendota al ĉiuj mensendintoj. Mendoj jam nun estas akceptataj. Direktu ilin al la Asocio.

Mono por la Asocio estu direktata ekskluzive al ties adreso sen indiko de ies nomo.

Ĉio rilatanta la asocion aŭ redakcion estu sendeinde skribata sur apartaj folioj sendeblaj tamen en unusama koverto.

На международния конгресъ ще бждат допустнати да пжтуватъ съ отстжпки и групово (общъ паспортъ), само напълно изправнитѣ членове къмъ Съюза. Нека това се има предвидъ, за да се избѣгнатъ излишни неприятности при уреждане на подобно пжтуване. Изключение за никого не ще се прави.

Всички дружества да съобщятъ освенъ постоянния си адресъ, но и мѣстото кждето биха били намирани винаги, при посещение на града имъ отъ наши или чужди съмишленици.

За знамената. Презъ време на XV-ия Есперантски конгресъ въ Враца, нерадостенъ бѣ факта, че на конгреса се явиха съ знамената си само Русе, Враца и Орѣхово. Желателно е щото всички дружества да си направятъ хубави знамена необходимими при конгреси и др.

Ако нѣма близо около ви др-во, Samideano, присъедини се къмъ сборната група на съюза, като внесете членската си вноска отъ 50 лв. **Tuj aliĝu!**

Въ касата на Съюза е постжпила сумата отъ 9357 лв. за издаване на учебника.

За знание на онези, които искатъ щото срещу изпратенитѣ суми, да имъ се изпрати нѣкой книги, залепки и др. или да се мине сумата въ фондъ „Savo“, че това ще стане следъ разпродажбата на учебницитѣ и прибиране сумитѣ.

DIVERSAJ.

За длжжницитѣ на Съюза.

Извѣстно е, че върху Съюза тежи едно бреме — дълговетѣ, направени отъ преди две години почти. Презъ миналата съюзна година се намали една частъ отъ тази тежестъ. И Съюза почна по свободно да диша. Това се чувствува отъ всички и се прояви презъ конгреса въ Враца. Но искаме ли окончателно да освободимъ Съюза, насъ самитѣ есперантисти отъ тази голѣма наша грижа, за да насочимъ и внимание, и енергия и сили къмъ други посоки. Искаме ли да разтворимъ широко гърдитѣ си и да извикаме: „Ний се освободихме отъ единъ кошмаръ, ний минахме крутия завой на кризата и сега сме предъ обширното равнище, гдето ни предстои една работа значението и целта на които сж за всички ясни“? Е, да — ний искаме това да стане. Но какво трѣбва да се направи? Трѣбва Съюза да събере своитѣ вземания. Ето защо длжжницитѣ на Съюза, а тѣ въ своето болшинство сами се знаятъ кои сж, трѣбва часъ по-рано да се издължатъ. Тѣзи,

които дължатъ на Съюза, безразлично дали нѣколко само лева или нѣколко хиляди такива, нека отдѣлятъ, нека откъснатъ каквото могатъ въ тѣзи, наистина трудни за живѣене времена. Но нали и Съюза ще трѣбва да живѣе? Изплатени дълговетъ къмъ Съюза — и Съюза ще изплати своитъ.

Нека се има предвидъ, че Ц. К. ще се стрѣми, въпреки всичко, да намалява, да изплаща съюзнитъ дългове. Той ще откъсва отъ средствата за други належащи нужди — но ще изплаща.

Но стига ли само това?

Съидейници, които дължите на Съюза, уредете веднага своитъ задължения!

Капит. Ст. Радевъ

Секрет. - касиеръ на Съюза.

Ц Е А.

Поканватъ се членоветъ да започнатъ плащането на вноскитъ за 1929 година.

Който не може да внесе цѣлата сума наведнажъ, може да я внесе на части по 50 лв.; членскитъ права ще добие следъ като бжде внесена напълно цѣлата сума.

Вноскитъ сж: за membro-abonanto 200 лв.; за membro 100 лв.

Който плати вноската си до 1 януарий 1929 год., ще получи премия единъ нумеръ отъ хубавата библиотека „Internacia Mondliteraturo“, по изборъ.

Всички суми да се изпращатъ на адресъ: **Ат. Д. Атанасовъ, София Алабинска и Лавеле (Глобусъ)** или чрезъ местнитъ делегати, ако има такива. Пращанитъ направо въ Женева суми създаватъ повече работа и на централното управление на ЦЕА, и на териториалния главенъ делегатъ; разпращането на годишника 1927 г. се забави за България именно поради свѣрвяване на списъцитъ на платилитъ у централата и тия у главния делегатъ.

БЮДЖЕТНИ БЕЛЕЖКИ.

За да може всѣки есперантистъ да знае финансовото положение на Съюза по отношение на гласувания бюджетъ, Ц. К. ще дава въ всѣки брой смѣтка на приходитѣ и разходитѣ. Съ това се цели щото всѣки да има ясна представа и въ зависимостъ отъ това да види при какви условия работи Съюза и самия той да насочва своята дейность съ цель — подпомагане Ц. К., гарантирайки му необходимитѣ финансови средства.

Настоящия балансъ дава положението до 31 октомври н. г. включително.

РАВНОСМѢТКА

на прихода-разходитѣ на Съюза отъ 1. VIII. 1928 г. до 31. X. 1928 г. включително.

ПРИХОДЪ		РАЗХОДЪ	
1. Отъ чл. вноски	1752.—	1. За „В. Е.“	2180.—
2. „ продажба стоки	780.—	2. „ зелената седмица	— —
3. „ абонамен. на „В.Е.“	3166.—	3. На кредитори	— —
4. За зелената седмица	120.—	4. Непредвидени	205.—
5. „ К. К.	610.—	5. Наемъ канцелария	500.—
6. Събрани отъ дебитори	— —	6. Канцеларски	2719.70
7. Непредвидени	10344.50	7. Заплати	1800.—
	<u>16772.50</u>		<u>7404.70</u>

Наличностъ къмъ 1 Ноемврий 1928 9367.80

Забележка I, Въ „непредвидени“ влизатъ и постжпленията за фондъ „Savo“, фондъ „П. П. З.“ и остатъка отъ миналата бюджетна година отъ 854.50 лв.

Забележка II. а) Отъ общия приходъ „чл. вноски“ сумата 1429 лв. сж постжпили за смѣтка на миналата година.

б) Отъ общия приходъ „К. К.“ — 535 лв. сж постжпили за смѣтка на миналата година.

в) Отъ общия разходъ канцеларски — голѣмата часть е изразходвана въ надвечерието и по подготвянето на XV конгресъ.

Отъ секретарь-касиера.

Настоящия двоенъ брой се изпраца на всички на които е изпратенъ и първия. Желаящитѣ да го получаватъ да си внесатъ абонамента, или да повърнатъ броеветѣ.

Kristana Esperantista Ligo Internacia (K. E. L. I.).

Dum la 20-a Kongreso de Esperanto en Antverpeno la K. E. L. I., kiu estas starigita sur evangelia kristanismo, decidis denove komenci viglan agadon. Kiu povas helpi je la disvastigo de Esperanto inter la kristanaro, estas petata sendi proponojn, monhelpojn kaj aliĝon al la ligo. Jarĉot. minimume 1 ŝilingo (angla). Oni adresu al s-ro. Paul Hübner, Bergstrato la Quedlinburg (Germanujo) aŭ al s-ro. C. A. Fairman 24, Binfield Road, Londono S. W. 4. (Anglujo).

TRA ESPERANTISTA FAMILIO.

NOVA ESPERANTISTA TOMBO.

Ni sciigas al la gesamideanoj, ke nia esperantista familio perdis ankoraŭ unu sindonan adepton de nia ideo

ALEKSANDR (SAŜO) PAROV

28 jara

kiu post longa malsanado mortis en Leyzin (Svisujo).

Lia morto ko-tuŝis ĉiujn liajn geamikojn kaj gesamideanojn Esperanto perdis bravan pioniron

Niajn kondolecojn al la familio

„Solidareco“—Ruse.

La 5-an de novembro mortis en Kazanlik pro aeroplana katastrofo nia samideano-aviadisto

SAVA SAVOV

en sia 30 jara aĝo.

La mortinto estiĝis fervora adepto de nia ideo tuj post la fino de la mondmilito kaj estis unu el la unuaj pioniroj de la disvastigo de Esperanto inter la bulgaraj aviadistoj.

Pacon al lia animo kaj eternan memoron.

FIANĈIĜO. S-ano Boris Ŝopov, membro de „Solidareco“ Ruse, kun f-ino Stanka Balgaranova. Gratulon!

EDZIĜOJ. S-ano Dosju Goĉev, membro de „Solidareco“ Ruse, kun f-ino Elenka Dimitrova. Gratulon!

— S-ano Ceko P. Petkov-poŝtovicisto en Lom, kun f-ino Ivanka T. Panova Gratulon!

— S-ano Virgil M h Ivanov vilaĝo Ajaglar (Popovo) kun f-ino Marijka St Serbezova. Gratulon!

ANONCETOJ.

(Vidu la tarifon sur la unua paĝo)

Korespondo.

S-ro SMIJA ŜINZOV. Hattaŝo, senhoku-gun, Osaka (Japanujo) 20 jara studento de meĥaniko, deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj aŭ leteroj pri diversaj temoj.

S-ro N. HOWLIN, 200 Grafton St. Voollahara. Sidneu (Aŭstralio) deziras korespondi kun bulgaraj gesamideanoj.

F-ino ILANJO SZEKCEJ. Str. Andrei Muresan 71 Alba Julia (Romanujo) deziras korespondi kun bulgaraj gesamideanoj.

DANKO. Esper. societo „Kulturo“ Plovdiv sincere dankas al gesamideanoj Yelland el Londono pri ilia subteno dum la restado en Plovdiv.

KOREKTO. En la unua numero, pri nia vizito en Bukarest erare estas presita la nomo Azmaovie anstataŭ Zalmanoviĉ. Ni petas pardonon.

Leterkesto.

K. ANT. populara banko en D. Via manuskripto bedaŭrinde netaŭga pro sia ne tute korekta lingvo. La ideon tamen ni aprobas. Daŭrigu bone ellerni la lingvon.

MITI. La versaĵoj ricevitaĵ tro malfrue por la nuna numero. Presotaj en la sekvonta.

ST. MAS. en K. Skribu sur unu flanko de l' folio. Atentu la lingvan korektecon kaj ne kontraŭstaru, ĉar la redakcio rajtas ĉion ŝanĝi laŭ sia bontrovo Pro tio ja nur ĝi respondecas. Skribante al la redakcio esprimadu vin pli milde. La paĝoj de nia organo ne povas esti uzataj por polemikado.

G. S en DAB. Via versaĵo en sia nuna stato bedaŭrinde ne taŭgas. Eble aperos, tamen iom ŝanĝita. Apostrofado de akuzativoj ne estas korekta. La versaĵeto de Käte Haselbauer aperos.

РЕКЛАМОЈ.

При Д. ТУДЖАРОВЪ — Т. Пазарджикъ
есперантска литература и значки по 9, 10, 11, 12 лева.
Каталогъ при поискване.

Излезе отъ печать:

PRI LA PERFORTO, MIĤITO KAJ REVOLUCIO

ОТЪ Л. Н. ТОЛСТОЙ

цена 10 лева.

Доставя въ предплата „Посредникъ“

Бул. Дондуковъ 61 — София.

Знаете ли,

че въ Япония сж пласирани повече екземпляри отъ книгата „El la Intima Libro“ (Ada), отколкото въ България? — А английскитъ есперантисти сж проявили много по-голѣмъ интересъ къмъ „Rememoroj de Esperantisto“ (Ada), отколкото българскитъ.

Дветъ тия книги на нашия съотечественикъ Ada се изпращатъ срещу 38 лв. (съ пощ. разноски) отъ: Агенция Пеликанъ, София, Алабинска 19.

Kornelshöring

Redakcio

Austria Esperantisto

Hugo Steiner

*Postfach 20
Kornelshöring bei Wien (Austria)*



GEESPERANTISTOJ ATENTU!

На 15 януарий 1929 г. ще бжде готовъ албумътъ на руски есперантисти

(Albumo de bulgaraj geesperantistoj),


люксозно издание — истинско есперантско украшение, който албумъ не трѣбва да липсва отъ масата на никой есперантистъ. Желаящитѣ нека побързатъ да изпратятъ най-късно до 20 декември 75 лева съ фотографията си и кратки бележки за себе си, следъ което ще получатъ 1 албумъ и клишето на изпратената фотография. Може да се изпраща всѣкаква фотография.

Издаването на албума е гарантирано.

Всичко да се изпраща на адресъ:

Международна агенция, ул. „П. Мъгловъ“ 4 — Русе.

Modeloj de Esperanto - Insignoj.



**La insignojn ĉe S-ro DIMITR IVANOV Prista 28 — Ruse.
Postulu prezaron!**

Presejo Dimitr Petroff str. „Gladston“ 6 — Ruse.